'Mutig vorwärts!'

Aŭstria Esperantisto

'Kuraĝe antaŭen'

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

9a jaro. N-o 2/3 Monata Februaro-Marto 1932

Redaktejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Administrejo: Bisamberg, Bundesstraße 154.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 4.88, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Aus dem Staatsverordnungsblatt „Riigi Teataja“ Nr. 19 vom 1. März 1932:
„149. Entscheidung der Regierung der Republik vom 18. Februar 1932.
Zu erlauben den Staatsbeamten, die Esperanto verstehen, in Uniform das Esperanto-Abzeichen auf der linken Brustseite zu tragen.
Grundlage: § 12 des Dekretes über das Uniformtragen der Staatsbeamten (R. T. 63-1930).

Staatspräsident K. Päts
Wirtschaftsminister A. Jürmann
Staatssekretär K. Terras

Tallinn, 18. II. 1932.

(Aus Informoj de E.-Asocio de Estonio, marto 1932).

Wiener Esperanto-Kurse nach der Cseh-Methode

finden in den Monaten April und Mai im I. (2 Kurse), II., III., V., VI., VII., IX., XIII., XVI. und XVII. Bezirke statt. Die Pfadfinder und das Schulbrüder-Hilfswerk veranstalten eigene Kurse. Weitere sind in Mödling und Klosterneuburg in Aussicht genommen.

Kursleiter: Herr Tiberiu Morariu aus Bukarest und seine Frau Lizzie Anderssen-Morariu aus Schweden. — Die Kurse umfassen 36 Unterrichtsstunden, je zwei zweistündige Lektionen in der Woche, und finden statt ab Dienstag, den 7. April von 5-7 oder 7-9 h abends, einige von 3-5 h.

Kostenbeitrag: Vollkarte S 6.—, für Angehörige S 4.—, Mittellose S 2.—; alles pro Monat. — Einführungsvorträge und Probelektionen in den genannten Bezirken; **Freikarten** hiezu sind vom Arbeitsausschuß Wiener Esperanto-Vereine schriftlich anzusprechen.

Andreo Cseh, der Leiter des Internationalen Cseh-Institutes in Haag (Holland), wird zur Eröffnung der Kurse selbst nach Wien kommen. Er wird am 6. April im Rahmen Wiener Friedensvereine über „Esperanto und die Idee des Friedens“ und am 12. April in der Leo-Gesellschaft über „Esperanto als sprachliche und gesellschaftliche Aufgabe“ sprechen.

Allen Interessenten, die dem Arbeitsausschuß ihre Adresse bekanntgegeben haben, gehen unmittelbar nach Ostern Kursprogramme und genaue Mitteilungen zu. Die Esperantisten wollen im Interesse eines großen Erfolges weitere Adressen von Freunden und Intessenten mitteilen.

Anfragen und Anmeldungen sind zu richten an Arbeitsausschuß der Wiener Esperanto Vereine, Wien IX. Löblichg. 3 (A 16-1-58).

Aŭstrio 1932.

Soeben ist ein neuer prächtiger, illustrierter Oesterreich-Prospekt in Esperanto erschienen, den das Ministerium für Handel und Verkehr für die Fremdenwerbung seit mehreren Jahren, einem dringenden Bedürfnisse Rechnung tragend, herausgibt.

Regierungsrat Steiner hatte auf seiner soeben beendeten Auslandsreise durch elf Länder Gelegenheit festzustellen, daß diese Prospekte überall begeisterte Aufnahme fanden. So wirbt man erfolgreich für sein Land!

Danziger Volkshochschule: Vortragsjahr 1932. Oberstadtsekr Bernh. Aeltermann: „Welthilfssprache Esperanto, Lehrgang in direkter Methode“ und Esperanto-Lehrerin Martha Schultz: „Einführung in die Esp.-Sprache, Grammatik, Sprechen“.

Alvenis el Genève la 26. III. jena telegramo:

Regierungsrat Steiner Bisamberg

Sincere gratulas sukcesojn vojaĝo kordankas laboregon ripozdevigan ĝojan paskon Esperantocentro

---

XXIVa Univ. Kongreso de Esperanto.

Paris, 30. julio—6. aŭgusto 1932.

Kongresa oficejo: La Maison de France, 101 Ave. des Champs Elysées, Paris VIII.

Kotizo: 125 fr. fr., post 1. julio 200 fr. fr.

Aliĝu tuj!

La aliĝintoj informu nin pri siaj aliĝoj.

Fakaj kunvenoj:

Kun la celo interesigi al E. multajn diversfakajn mediojn en Paris, Komisiono de fakaj kunvenoj deziras faciligi al la diversaj esperantistaj faksocietoj rekontiĝon kun la respondaj samfakaj asocioj en la kongresurbo aŭ eĉ oficialan inviton de la diritaj asocioj.

Tial 1. ĉiu Fakasocio de Esp.-istoj informu tuj la Komisionon, ĉu ĝi bezonas apartan ĉambron en la kongresejo — por kiom da personoj proksimume — kaj eventuale pri la programo de la kunsido.

Tial 2. ĉiu kongresano, kiu deziras partopreni unu aŭ plurajn fakajn aŭ profesiajn kunvenojn, bonvolu montri la specialan fakon, je kiu li havas intereson.

Skribu rekte al Komisiono por Fakaj Kunvenoj: Esperanto, 3 Bld. Pasteur, Paris 15.

I. Internacia Lingva Konferenco en la E.-Domo en Arnheim.

En Heroldo de Esperanto n-ro 9 kaj 11 aperis la artikoloj „Ĉu ni havas organizon, aŭ ĉu ni ne havu ĝin?“ kaj „Lingvaj diskutoj en Arnhemo“, kiuj temas pri la agado de Internacia Cseh-Instituto.

Ĝi kunvokis I. Intern. Lingvan Konferencon al Arnheim (25.-29. III.).

Heroldo nun asertas, ke Cseh-Instituto ne havas la rajton kunvoki sen kontakto kun la oficialaj gvidaj instancoj de nia movado iujn ajn konferencojn ktp. Heroldo diras, ke Cseh multon utilis al la E.-movado, sed ke li restu ĉe sia unua celo, instrui la mondon pere de kursoj laŭ Cseh-metodo.

Sed Cseh-Instituto instalis la E.-domon kiel hotelon kun kostoj de 10.000 aŭ 20.000 ned. guld., kunvokis nun Int. Lingvan Konferencon sen kontakto kun la gvidaj E.-organizoj kaj eĉ eldonas apartan gazeton.

Tion kondamnas multaj esperantistoj en la landoj, kiujn mi traveturis, kaj ankaŭ mi. ICK gvidu la movadon, Cseh instruu, Lingvan Konferencon kunvoku Lingva Komitato, hotelojn mastrumu hotelestroj ktp.

Ni bezonas fortan organizon, ĉar ĝi havas ankoraŭ suficĉan laboron. Kaj la aliaj esperantistoj subtenu la Centron kaj ne laboru memstare! St.

Int. Esperanto Muzeo en Wien

Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.

Telefono n-ro R 27-803

Malfermata labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h.

Novaj membroj:

Internacia Honora Komitato:

Danzig:

Episkopo **Eduard Graf O'Rourke** en Oliva.

Danujo:

A. V. Paulen, estro de la gazetservo en Ministerio por Ekstero.

Estonio:

Episkopo **Jakob Kukk** en Tallinn.
Albert Saareste, prof. de lingvoj en Universitato de Tartu.

Finnlando:

Ĉefministro **J. E. Sunila.**

Latvujo:

Ministro por Instruado **A. Keninš**
Ministro por Komunikado **A. Kursits**

Litovujo:

Ministro por Instruado **inĝ. K. Šakenis**

Polujo:

Ministro por Instruado **Jan Jendrziewicz**
Rektoro de Universitato Warszawa
d-ro **Jan Lukasiewicz**

Svedujo:

Burgemester de Stockholm **Gunnar Fant**

Esperantujo:

Prelato d-ro, d-ro h. c. **A. Dombrowski,** Kaunas, Litovujo
Paul Nylen, Stockholm, Svedujo

Internacia Kuratora Komitato:

Danzig:

Aeltermann Bernhard, urba ĉefsekretario

Estonio:

Brauer Karl, impost-insp., Tallinn
Inĝ. **Waher Willem,** lernejdirekt., Tallinn

Pro mia vojaĝo, kiu pro troa okuoiteco eĉ ne permesis al mi skribi leterojn hejmen, Aŭstria Esperantisto aperas nun 16 paĝa kiel n-roj 2/3. N-ro 4 aperos fine de aprilo. Bonvolu afable senkulpigi tion! Sincere Steiner.

Finnlando:

Salokannel Hugo, Salminen
Mag. **Setälä Vilho**, Helsinski

Latvujo:

Indra Talivalda, instr., Riga

Norvegujo:

Kand. filol. **Bonnevie Honoratius**, Oslo
Kapitano Rolf **Bugge-Paulsen**, Oslo

Svedujo:

Rektoro **Jansson Sam**, Stockholm
Malmgren Ernfrid, instr., Stockholm

Dumvivaj membroj de IEMW (S 15.— en 3 partpagoj, postulu ĉekojn!: Por alilandanoj sv. fr. 12.50)

318. Dolezalowa Anna, 319. Weinsberg Rena, 320. Bertig Hermina, muzikinstr., 321. d-ro Dreher Leop., 322. Rudnicki Stan., 323. Alfus Josef, 324. Goldberger Leop., 325 Wiesenberger Ign., ĉiuj Krakow; 326. Hodakowski Tadeusz, Nowy Sacz; 327. d-ro Robin Wilh., Warszawa; 328. Szainholc Jozef, 329. Lejzerowicz S., 330. Kopff-Glowacka Regina, ĉiuj Lodz; 331. Mürquart Käthe, 332. Matriciani Oskar, 333. Ruttkowski Kurt, 334. Tuschinski Klara, 335. Tuschinski Anna, 336. Aeltermann Bernh., ĉiuj Danzig; 337. Osowicki Wolf, 338. Meiloch Bertha, 339 Gutman Heszel, ĉiuj Bialystok; 340. Janitzki Emilie, 341. Kotzin Therese, 342. Linde Base, 343. Branche Kreelo, 344. Balĉiunas Ignas, 345. Kazlauskas Vladas, ĉiuj Kaunas, Litovujo; 346. Indra Talivalda, instr., 347. Ginters Arvids, masaĝisto, 348. Grots Edgaro, ofic., 349. Juŝen Ottilie, instr., ĉiuj Riga, Latvio; 350. Parrij Wilma, Pärnu, Estonio; 351. Koppel Harry, fervoj., Tapa, Estonio; 352. d-ro Richter Hans, univ. prof., 353. Raukas Viktor, instr., ĉiuj Tartu, Estonio; 354. Brauer Karl, impost-insp., 355. Waher Willem, inĝ kaj lernejestro, 356. d-ro Roots Rich., kurac., 357. Rosenberg Jakob, 358. d-ro Kolomojcev Mihail, kurac., 359. s-ino Friedland F., ĉiuj Tallinn, Estonio; 360. Salokannel Hugo, staciestro, Salminen, Finnlando; 361. Anttila Werner, lektoro, Helsinki, Finnl.; 362. Bengtsson G. M., fervoj., 363. Mossfeldt K. N., ministo, 364. Nilsson Aron, maŝinisto, 364. Ottersfors Gunnar, instr., ĉiuj Kiruna. Sved.; 366. Jansson Sam Owen, Lidingö, 367. Josefson Helmi, Stockholm; 368. Jansson Sam, rektoro, Lidingö; 369. Larson Ad., Appelviken; 370. Nordkvist Helge, Aelsten; 371. Malmkvist Erik, Appelviken; 372. Eriksson Bernh. k. 373. Malmgren Ernfrid, instr., Stockholm; 374. Brink Ernst, Upsala; 375. Hohnström Ebba, Enköping; 376. Uno Sven Rud., Stubbhagen; 377. Sager Carl, ferlaboristo, Nya Brinken; 378. Petterson Carl Jos., lignaĵisto, Vinnerstad; 379. Petterson Bertil, Holm; 380. Ström Fritz, Kumla; 381. Carlen Erik, ofic.. Yxhult; 382. Goldheim Tage, 383. Lindquist Bertil, 384. Lindquist Närta, ĉiuj Kumla, Svedujo; 385. Abrahamson Ragna, Hamar; 386. Nordstrand Birger, instr., 387. Lövli Johan, poŝta pakisto, 388. Graff-Holmen Kaja, prof-ino, ĉiuj Trondheim; 389. Bugge-Paulsen Rolf, kapitano. 390. Nagel Dagmar, 391. Almquist Margaretha, ĉiuj Oslo; 392. Sandberg Liv, Bekkelaget; 393 Shay Edith, 394. Bye Rosa, 395. Arnessen Arne revizoro, 396. Grönneberg Esther, 397. Bonnevie Horatius, ĉiuj Oslo, Norvegujo; 398. Dahl Einar, instr., Uddevalla; 399 Hansson J. A., fe v., Munkedal; 400. Ekström Erik, Göteborg; 401. Björklid Martin, instr., Nässjö; 402. Nilsson Edvin k. 403. Wolff Karl, ambaŭ meblistoj, Bodafors; 404. Ysner Henry, instr., Hällevik; 405. Jönsson Erik, instr., Nogersund; 406. Nilson Ella, Sölvesborg; 407. Greek Carl, Malmö; 408. Ek John, instr., Lund; 409 Ihrborn O N, Skegrie; 410. Olsson Olle, Höör, ĉiuj Svedujo; 411. Noll Margarethe, 412. Mikkelsen Asta, instr, 413. Petersen Anna, 414. Jahn C. J., 415. Jensen Otto, instr., ĉiuj Kobnhavn, Danujo; 416 Habellock Georg, afergvid. de GEL, Berlin; 417. Brunner Traudl, Prachatitz, CSR.; 418. Blicher L., Kobnhavn.

Grupoj ktp. kiel membroj por 10 jaroj (la sama kotizo):

21. Eldona Societo Esperanto, Stockholm; 22. Norvega Esperantista Ligo, Oslo; 23. Klubo Esperantista en Oslo, Oslo; 24. ABF-s Esperantoklubb, Göteborg, Svedujo; 25. Esperanto-Verein, M.-Ostrau.

Materialo ricevita:

638. Int. Cseh-Instituto de E., Haag; 639. H. I. Pätiälä, Turku, Finnlando; 640. Mustafa Raden, Jerusalem; 641. Schlesischer E.-Verband „Sileo", Löwenberg i. Sch. 642. C. Rousseau, Bécon, Francujo; 643. T. I. Guèritte, Surbiton, Anglujo; 644. Belisma Koopera Kulturejo, Kuturajama, Sunto-Gun, Jap.; 645. H. Sentis, Grenoble; 646 Ach. de Maertelaere, Gent; 647. Int. Cseh-Instituto de E., Haag; 648. Florov, Rostov, USSR; 649. la sama; 650. Friedrich Piper, Vechta i. Oldenburg; 651. Literatura Mondo, Budapest; 652. Foire Int. Lyon; 653. Mustafa Raden, Cairo; 654. Petro Surjanenko, Valki, Ukrainio.

„100.000 S Garantia Kapitalo"

Jam publikigita	S 1137.15
El kotizoj	85.—
entute	S 1222.15

Por IEMW: Steiner.

Oficiala Dokumentaro Esperantista.

Dudektria Universala Kongreso de Esperanto (Krakow, 1.—8. Aŭgusto 1931). Sur 124 paĝoj: Oficiala Protokolo, Raporto kaj Statistikoj kaj Raportaro de la oficialaj institucioj al la 23-a Universala Kongreso de Esperanto.

Memoro je Goethe.

Dumnoktaj pensoj.

Vin bedaŭras mi, senĝojaj steloj,
Kiuj bele kaj brilege lumas.
Vojon montras al ŝipist' serĉanta,
Sen ke homoj, dioj al vi dankas.
Ĉar neniam konis vi la amon!
Vin senĉese la rigidaj leĝoj,
Pelas for tra la senfinaj sferoj.
Multajn mejlojn vi jam iris pluen,
Dum, en brak' amata restadante,
Mi forgesas la meznoktan horon.

La Revido.

Li.
Amikino, nur unu, jus unu kison permesu
Al miaj lipoj! Ho nun, kial ŝparegas vi?
Arbo floradis hieraŭ, hodiaŭ ni kisojn don- [acis
Mil; al la abelar' ilin komparis ja vi,
Kiuj alflugis la florojn, suĉante, ŝvebante, senĉese,
Dum estiĝis la son' ama de dolĉa ĝuad'.
Ĉiuj ekzercas ankoraŭ negocon la ĉarman Por ni nur
Ho, ĉu forpasis printemp' antaŭ pereo de l' flor'?

Ŝi.
Revu, amiko amata, parolu al mi pri hieraŭ.
Mi aŭskultos kun ĝoj', koren alpremos vin.
Vi ĝin diris ‚hieraŭ'! — La tago estis belega,
Vorto eksonis post vort', kisoj urĝsekvis al
Estis malĝoja disiĝo vespere, malgaja [kis',
la nokto.
Longa ĝis nuna la tag', kies ordono - forest'!
Sed la mateno revenas. Ho, ke bedaŭrinde
Dume dekfoje al mi donis floraron [la arbo kun frukt'.

Tradukis d-ro fil. W. Biehler.

Gravaĵoj.

Aŭstrio 1932.

Nova belega multkolora prospekto estas denove eldonita de Ministerio de Komerco kaj Trafiko en Wien Ni dankas kaj gratulas la koncernan oficejon en la ministerio (ĉefo: ministeria konsilisto d-ro inĝ. Friedrich Steiner, decernento: minist. kons. inĝ. Erwin Deinlein) pro la rekono de la valoro de Esperanto en la internacia trafiko.

Kiu deziras sendi tian prospekton alilanden, sendu al IEMW adresitan kun 8 gr. afrankitan koverton; ni ekspedos ĝin tuj!

Weimar, Goethe Memorjaro 1932.

Weimar, la urbo, kie nunjare en multaj aranĝoj oni festas la memoron je Goethe, eldonis belegan 8 paĝan prospekton kun bildo de Goethe, 12 vidindaĵoj kaj landkarto (Verkehrsverein Weimar kun UEA). Mendu senpage ĉe Verkehrsverein Weimar.

Bulteno de „Centro de studentaj esperantistaj organizaĵoj", Zagreb, Primorska 11, SHS, aperis en februaro nj.

Norvega Esperantisto post kelkjara neapero reeldoniĝis en sia 3. periodo Ĝi estas la organo de Norvega Esperantista Ligo. Redaktoroj: Kand. fil H. Bonnevie, Bergsliensgt. 11, Oslo kaj Kapitano R. Bugge-Paulsen, sekr. f-ino Liv Sandberg. Abono 3 Kr. pojare.

Ni gratulas kaj deziresprimas grandan sukceson laŭ la jam en la lasta tempo faritaj spertoj.

„Esperantistul", la sola nuntempa rumanlingva E.-revuo, eld. de D. N. Minĉev, Constanta, Rumanujo, aperas sub la morala protekto de la gazeto „Marea Noestra" depost januaro 1932.

„Oesterreichisches Kongreßbüro" de 1. febr. estas aligata al „Oesterr. Verkehrsbüro". Ĉiujn informojn koncernantajn kongresojn bonvolu de nun direkti al Oesterr. Verkehrsbüro, Wien I. Friedrichstr. 7.

Eŭkarista Kongreso en Dublin, junio 1932.
Irlanda Ligo de Katoikaj Esperantistoj, Dublin C 3, 1 Wellington Quay, penadas aranĝi Esperanto-fakon dum la Eŭkarista Kongreso kaj la sekr. H. Mc. Neill Macauley petas ĉiujn, kiuj deziras partopreni, sin anonci tuj.

BES-a Adresaro aperos en sia 10. eldono dum majo 1932. Tarifo: Adreso dulinio 0.50 Fsv., ĉiu plia linio, publikigo de portreto kaj „Nova eldono antaŭpage" po 0.50 Fsv. Aliĝu senprokraste: BES, Potŝtejn, CSR.

Enketo pri interlerneja E.-Korespondado estos aranĝata de prof. Gaetano Facchi, Brescia, Corso V. E. 63. Geinstruistoj de E. skribu pri siaj spertoj en interlerneja korespondado al la supra adreso.

Kiel akiri la mondon? titoliĝas artikolo en Heroldo (6. III.) de fervora s-ano Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo, kiu montras vojojn atingi nian celon kiel eble rapide. Legu la artikolon!

Wie denken Sie über Esperanto?
Sub ĉi tiu titolo fakinstr. Hans Jungschaffer, Ried i. I., Ob. Oest, Bahnhofstr. 22, deziras eldoni en formo de dialogo interesan broŝuron, kiu servu kiel bona propagandilo. Prezo po 40 gr. Mendu tuj!

Ŝercangulo.

Mark Twain: „Bonvolu pruntedoni al mi tiun novelon."

Najbaro: „Estas mia regulo, neniam ellasi libron de mia hejmo. Sed vi povas ĝin legi en mia sidoĉambro".

Kelkajn semajnojn poste.

Najbaro: „Bonvolu pruntedoni al mi vian falĉmaŝinon."

Mark Twain: „Estas mia regulo, neniam ellasi mian falĉmaŝinon de mia herbejo. Sed vi povas uzi ĝin tie ĉi."

Mia varbvojaĝo por Austrio.

Pere de paroladoj kun lumbildoj, filmoj kaj akompana muziko varbi por mia patrolando Aŭstrio estis la celo de mia varbvojaĝo, kiu min kondukas tra 11 landoj, nome Polujo, Danzig, Litovujo, Latvio, Estonio, Finnlando, Svedujo, Norvegujo kaj Danujo, fine tra Germanujo kaj Ĉeĥoslovakujo hejmen.

Kvankam mi parolas la germanan, anglan, francan kaj italan lingvojn, mi tamen ilin ne povas uzi en la plej multaj de la menciitaj landoj. Necesis nia ideala helpilo — Esperanto.

Mi jam intencis tian varbvojaĝon antaŭ pli ol unu jaro al Anglujo ktp. Sed tiam la tempo ne estis sufiĉe favora. Nun proponis al mi dum la lastjara Krakova Kongreso la direktoro de ICK, s-ano Robert Kreuz, entrepreni tian vojaĝon kiel Speciala Delegito de ICK.

Hejmenveninte mi priparolis la aferon, fari varbvojaĝon por Aŭstrio kun helpo de ICK, kun la kompetentaj personoj en la koncernaj oficejoj en diversaj konferencoj kaj la sukceso de miaj klopodoj estis, ke la aŭstriaj administraroj konsentis la helpon de ICK.

Mi raportis pri mia vojaĝo al:

Ŝtatprezidanto de Aŭstrio, s-ro Wilhelm Miklas,
Kanceliero (ĉefministro) d-ro Karl Buresch
Ministro por Ekstero d-ro Johann Schober
Urbestro de Wien, s-ro Karl Seitz
Sekcia ĉefo en kancelierejo d-ro Franz Uebelhör
Ambasadoro kaj ministro en Ministerio por Ekstero s-ro Junkar
Min. kons. en Ministerio por Komerco, d-ro inĝ. Friedr. Steiner
Min. kons. inĝ. Erwin Deinlein
Ĝeneraldirektoro de Nationalbibliothek univ. prof. d-ro J. Bick
Ĝeneralsekretario de la Aŭstriaj Fervojoj, d-ro Jarry
Min. kons. de Aŭstriaj Fervojoj d-ro Steyrer
Direktoro de Komisiono por Fremdultrafiko de urbo Wien, kortega kons. d-ro Ziegler kaj aliaj.

Subtenis mian vojaĝon por Aŭstrio:

Kancelierejo
Ministerio por Ekstero
Ministerio por Komerco
Aŭstriaj Fervojoj
Komisiono por Fremdultrafiko de urbo Wien.

ICK preparis en grandega, streĉiga laboro mian vojaĝon. Neniam antaŭe mi povus imagi, kiom da penadoj kaŭzas la preparo de tia vojaĝo, kiom da leteroj estas necesaj kaj kiom da zorgoj kaj ĉagrenoj ili kaŭzas al la aranĝanto. Nun mi mem povas tion plej bone juĝi kaj volonte mi publike dankas al ICK, kiu per sia granda laboro helpis mian laboron por mia patrolando.

Nun la 14. de januaro mi komencis mian vojaĝon samtempe kiel Speciala Sendito de ICK, kio montru la praktikan flankon de Esperanto, kiu faciligis, ja plejgrandparte nur ebligis mian varbvojaĝon por Aŭstrio.

Oficiale mi ne ekvojaĝis por Esperanto, sed por Aŭstrio, sed uzante kiel helpilon — nian Esperanton.

Tiu praktika uzado de Esperanto, rekonita kaj akceptita de oficialaj administraroj de Aŭstrio, multe efikos ĉe la oficialaj administraroj kaj

eminentuloj en la diversaj landoj kaj plej okultrafe montros al ili la veran valoron de Esperanto.

Varbi por Esperanto estas bela, ideala afero, sed varbi per Esperanto signifas la montradon de la neceseco kaj utileco de Esperanto ankaŭ al la skeptikuloj kaj per tio samtempe grandstilan propagandon por Esperanto!

Do la 14. de januaro mi ekvojaĝis el mondkonata vilaĝo Bisamberg ĉe Wien, Aŭstrio, mia restadejo, tra Wien, sidejo de Internacia Esperanto-Muzeo, en la direkto al Polujo. Kun 4 valizoj — du el ili enhavas 3 filmojn, 140 lumbildojn (diapozitivojn), 15 gramofondiskojn*, skribmaŝinon kaj magazenon de papero ktp. — aktujo kaj gramofono kaj provizita kun multaj ordonoj kaj konsiloj flanke de ICK (en la lasta tempo alvenis ĉiutage multaj skribaĵoj) mi komencis mian vojaĝon. La aŭtomobilo, kiu min venigis de unu stacio al la alia, preskaŭ ne povis kunpreni ĉiujn.

Post adiaŭo de miaj filoj, kiuj min akompanis, mi veturis norden. La pejzaĝo ĝis Lundenburg-Breclava ne estas tiel interesa, ke mi raportu pri ĝi. En Breclava la unua agrablaĵo: mi devis portigi ĉiujn miajn pakaĵojn en la limdoganejon. Ĉi tie la unua doganisto decidis, ke mi laŭ la leĝaj ordonoj devas sendi miajn valizojn, provizitaj kun plumbaĵoj de la doganejo, ĝis la alia limo kontraŭ Polujo kiel vojaĝpakaĵaron. Sed ĉar enestis rompiĝemaj aĵoj, mi entute ne deziris obei la ordonon de la doganisto kaj iris al la doganoficisto, kiu samopiniis. Sed la ĉefo, vidinte mian rekomendleteron de la Ministerio por Ekstero, en tre ĝentila maniero permesis la simplan kunprenon en mia kupeo, fidante al mi, ke mi ne dumvoje ion vendos.

Alveninte posttagmeze en M.-Ostrava, kie mi vizitis parencojn kaj aĉetis du parojn da ŝuoj por la prezo de unu paro en Aŭstrio, mi nokte daŭrigis mian vojaĝon kaj alvenis en Krakow la 15. antaŭtagmeze. S-anoj atendis min en la stacidomo, kondukis min en la hotelon, kie mi estis gasto de nia malnova E.-pioniro univ. prof. d-ro Odo Bujwid, prez. de Pola E.-Delegitaro kaj Honora Membro de Int. E.-Muzeo en Wien. Post vizito al prof. Bujwid, kiu pro malsaneto devis resti hejme, okazis tia ĉe la vojevodo de la urbo kaj regiono Krakow, s-ro Kwasniewski, kiun mi laŭ peto de prof. Bujwid invitis en la Int. Honoran Komitaton de IEMW. Poste granda intervjuo ĉe la plej grava gazeto de Krakow „Illustrowanj Kurjer Godziennj", kiu aperigis ĝin kun bildo. La aliaj gazetoj raportis ankaŭ. — La publika parolado okazis en la salonego de Industria Muzeo, kies direktoro s-ano inĝ. Tor multe helpis. Pli ol 150 personoj ĉeestis, inter ili la aŭstria konsulejsekretario Citt, anstataŭante la malhelpitan konsulon Vojnovich. La lumbildoj, filmoj kaj aŭstria muziko ege plaĉis al la publiko kaj nia konata pioniro d-ro Dreher (Turno) nome de multaj esperantistoj diris, ke neniu antaŭa E.-aranĝo estis tiel efika kaj li estas certa, ke la varbvojaĝo havos sambonan sukceson por Aŭstrio kiel por nia Esperanto-afero. — Bedaŭrinde la propagando por la parolado estis ne sufiĉa kaj oni eĉ ne pripensis inviti la aŭstriajn societojn kun pli ol 300 personoj. Alie la sukceso estus estinta multe pli granda.

La 16. vizito al la kuratoro de lernejoj por la vojevodio Krakow, sinjoro Nowicki, raporto al li pri la grava rekono de Esperanto en la sfero de lernejaj fakuloj en Aŭstrio kaj instigo al koncerna raporto al la instruministerio en Warszawa. Tagmeze mi estis gasto de la ĉiam fervora s-ino Neuberger kaj meznokte forveturo al Warszawa.

17. januaro. Warszawa, bela parte antikva urbo. La urbestraro havis la bonan ideon renovigi la ĉefplacon de la Malnovurbo laŭ iama aspekto. Longe mi staris tie kaj faris multajn fotografaĵojn. Priskribi Warszawa nenecesas,

---

*) La gramofonon kaj la diskojn la firmo E. Reischer, Wien, IV. Rechte Wienzeile 37 disponigis je ege rabatita prezo, montrante per tio helpemon al Esp.

ĉar multaj s-anoj jam vizitis ĝin okaze de la diversaj aranĝoj. S-ano Bermann, kiu dum certa tempo loĝis en Warszawa, akceptis min matene en la stacidomo, gastigis mi kaj montris al mi la urbon.

18. I. Vizito al la aŭstria ambasadoro, al kiu mi havis rekomendleteron flanke de la aŭstria ministerio por Ekstero. La anstataŭanta legacia konsilisto barono Freudenthal aranĝis miajn vizitojn al la ministerioj por Ekstero kaj instruado. La aŭdienco ĉe la ŝtatprezidanto ne povis okazi, ĉar la prezidanto dum mia ĉeesto en Warszawa estis sur ĉasado. S-ro min. kons. Woitkowski en la ministerio por Ekstero estis tre afabla homo, aranĝis tuj la viziton al la Instruministro, kiu pro parlamenta kunsido ne povis akcepti sed disponigis, ke la unua sekcia ĉefo s-ro Kielski min akceptu. Sed ĉi tie, kiel ankaŭ kelkfoje pli poste, mi devis fari la sperton, ke la necesaj, influhavaj personoj ne sufiĉe estas informitaj pri la nuna stato de la movado. Ne temas pri la landa movado, sed pri la sukcesoj en tutmondo kaj speciale pri tiuj sur la agadkampoj de la koncernaj kompetentuloj, gajnotaj por ni! En Polujo oni nun ellaboras novan reformon por la lernejoj kaj la ĝusta informo pri Esp. certe estis necesa. S-ro Kielski petis precisajn informojn pri E. en la lernejoj kaj montris sin tre favora al E. — Mi lin petis, ke li transdonu al la Instruministro Jendrziewicz, mian peton, eniri la Internacian Honoran Komitaton de IEMW kaj viziti mian prelegon. —

Mi faris viziton al la Zamenhof-strato kaj fotografis ĝin.

19. I. Vizito al la rektoro de la universitato, fama prof. Jan Lukasiewicz, kiun mi invitis en la Intern. Honoran Komitaton de IEMW, kaj li akceptis. La vizito estis aranĝita de la Ministerio kaj d-ino Ender min akompanis. Poste mi vizitis la familion Zamenhof: Zofja kaj Lydja mi renkontis hejme kaj Felix min invitis al tagmanĝo, kiun mi je mia bedaŭro ne povis akcepti pro alia aranĝo. — Vespere mi parolis en kunveno, kiun aranĝis Pola Esp.-Asocio, kaj nur ĉeestis kelkaj personoj. Tiam je la fino de la dua tago mi jam konatiĝis kun la aranĝantoj de mia Warszawa restado.

19. I. Vizito al la tombo de l' majstro kaj fine mi ankaŭ iomete rigardis la urbon. — Vespere lumbild- kaj filmparolado en bela salono. Ĉeestis 230 personoj, inter ili la leg. kons. barono Freudenthal kun leg. kancelaridirektoro de la aŭstria legacio, krome du s-roj el la ministerioj de instruado kiel reprezentantoj de la ministro Jendrziewicz kaj sekcia ĉefo Kielski. Unu el ili transdonis la saluton de la ministro kaj lian konsenton, eniri en Intern. Honoran Komitaton de IEMW. — La tuta familio Zamenhof ĉeestis: Leono, Feliks kaj Adam kun edzinoj, Zofja kaj Lydja. — Tamen la aranĝo ne estis sufiĉe lerta. — Mi petas pardonon, se mi kritikas aŭ laŭdas la aranĝojn, eble tia kritiko ankaŭ ne estas tute laŭ la deziro de ICK, sed mi opinias, ke mi ankaŭ per tia kritiko havigos al mi novajn malamikojn. Sed s-anoj, kiuj pensas kiel mi — unuavice helpi la movadon — komprenas mian vidpunkton kaj eble laŭdos min pro mia kuraĝo kaj sincereco, ankaŭ kiam koncernas ilian propran personon.

20. I. antaŭtagmeze forveturo al Plock. Danki mi devas speciale al s-ro Bermann, kiu zorgis pri mi vere amike. Sen li mi estus travivinta la tagojn en Warszawa sen esp.-istoj, ĉar aliaj ŝajne ne havis tempon.

En Plock alveno posttagmeze. En la stacidomo atendis pastro Furmanik, konata jam en la E.-kongresoj, kaj UEA-del. Kon. — Per aŭtomobilo ni veturis al la monaĥejo de la mariavita ordeno. Poste vizitoj al Starosta (distriktestro), urbestro kaj al gazeto Dziennik Plocki, kiu ankaŭ tre favore raportis pri la parolado. — La tagmanĝon mi prenis kun episkopo Feldmann, tre simpatia kaj afabla personeco, kaj kun pastro Furmanik. Poste vizito en

la lernejo de la ordeno, kie en ĉiuj klasoj la infanoj min akceptis per Esperanto-saluto kaj en la pli altaj klasoj ĉiam unu el la lernantinoj alparolis min per pli longa bonvensaluto. Vere kortuŝa akcepto. Kaj kiel modelaj estas la instalaĵoj en la lernejo! Krome mi vizitis la laborejojn de la monaĥinejo kaj mi vizitis ĉe ilia laboro ŝuistinojn, tajlorinojn ktp. Episkopina moŝto Feldmann, la edzino de l' episkopo, estras la monaĥinejon kaj montris al mi ĉiujn detalojn. Mi esprimas al ŝia moŝto mian plej koran dankon pro tiu afableco. — La vizito al la preĝejo estis ege interesa. — En la granda salono de la monaĥejo oni aranĝis treege belan solenon*. Ĉeestis 500 personoj, inter ili ĉefepiskopo de la malnov-katolika ordeno de la Mariavitoj Kowalski kun edzino, priorino kaj ĉefepiskopino de Fratinoj Mariavitaj, episkopo Filip Feldmann kaj edzino, episkopino, kaj episkopo de Pola Malnov-katolika eklezio el Ameriko Joseph Zielonka kaj reprezentantoj de la loka registraro. La vespero fariĝis granda honorigo por mi. Muziko ludis la himnon; nome de la junularo parolis studento Kaczinski, por la ĉeestantoj M. Sitek; ĥoro ekkantis „La fratoj leviĝu" en E.: poste Pastro G. Furmanik, redaktoro de la revuo „Renkonte al la suno" kaj fervora s-ano, parolis pri „La signifo de peresperanta propagandvojaĝo de s-ro Steiner"; sekvis vivaj simbolaj bildoj kaj fine mia parolado kun lumbildoj. — Vespermanĝo en la societo de episkopo Feldmann kaj pastro Furmanik, kiun ĉeestis ankaŭ UEA-del. Kon, finis ĉi tiun vere belan tagon. —

La 21. I. matene je la 4 h mi jam devis per aŭtomobilo forlasi la gastigeman monaĥejon, kie mi estis volonte akceptita gasto, kaj ne povis sekvi la invitojn de la ĉefepiskopo kaj episkopo, resti kelkajn tagojn kiel gasto. Vera Esperanto-hejmo, kie preskaŭ ĉiu komprenas E.-on! Kaj kiel adiaŭo mi trovis en mia ĉarma ĉambro pakaĵon kun dolĉaĵoj, kiujn la episkopo farigis por mi en la monaĥeja cukeraĵejo. Kaj kiu vekis min je la 3 h matene? Mia maljuna amiko Furmanik, kiu nepre volis min akompani al la stacidomo, kion mi ne permesis. Sed vere amikan adiaŭon ni havis kaj ni kortuŝite kisis unu la alian. Mi neniam forgesos ĉi tiujn malmultajn belegajn horojn!

La 21. I. mi alvenis en Lodz, atendita de s-anoj, kiuj vere zorgis pri mi. Vizito al la aŭstria vickonsulo Brun, direktoro de la firmo Schenker en Lodz, kiu promesis enkonduki sur la leterpapero de sia firmo la surskribon „Oni korespondas per Esperanto". La firmo havas grandan trafikon kun alilandaro. Poste vizitoj al la gazetoj Neue Lodzer Zeitung, Freie Presse, Glos Poranny kaj Republika, kiuj ĉiuj favore raportis pri mia vojaĝo kaj promesis regulan Esperanto-angulon. — Vespere mi parolis pri la E.-movado kaj IEMW en la grupokunveno, kiun ĉeestis pli ol 150 esp.-istoj. La movado, kiun estras L. K. Lejzerowicz, estas tre vigla kaj mi dankas speciale al Lejzerowicz pro liaj afablecoj al mi. Li promesis ankaŭ nun provi enkonduki E.-on en la germanan (30 % de la loĝantaro) kaj en la polan societon kaj certe li sukcesos, kion mi ege deziras al li. Publika parolado ne okazis. Ĝis meznokto ni kunestis kaj poste oni min kondukis al la stacio, de kie mi forveturis al Danzig.

22. I. alveno al Danzig je la 10 h. Mi jam en antaŭaj lokoj ricevis el Danzig programon pri mia farota laboro. Oni tiel precize ellaboris la horaron por mia laboro, ke preskaŭ ĉiu minuto estis eluzata. Belege oni min loĝigis en Hotelo Danziger Hof. Tujaj vizitoj al la 4 plej gravaj gazetoj „Danziger Landeszeitung", „Danziger Allgemeine Zeitung", „Verband der Danziger Presse" kaj „Danziger Sonntagszeitung". Du el ili promesis de nun regulan

*** La ordeno de Mariavitoj kun la ĉefsidejo en Plock, Polujo, estas malnov-katolika. La membroj de la ordeno povas edziĝi sed nur kun membrinoj de la ordeno.**

E.-rubrikon. — Ĉar la prezidanto de la Danzig-a Senato forestis en Genève, akceptis min dum pli ol duonhoro la Vicprezidanto de l' Senato d-ro Wiercinski-Keiser. Dum mia raporto al li pri la E.-movado mi ankaŭ rimarkis, ke la policistoj en Danzig portu la E.-insignon dum la deĵoro, kiel ili tion faras en Wien. La vicprezidanto petis, ke mi sendigu modelon de la E.-ŝildeto, kiun portas la policistoj en Wien, pere de s-ro Aeltermann al li. Sekvis vizitoj ĉe Regierungsrat Blume en la oficejo por eksteraj aferoj kaj ĉe senatoro Kurowski, nuntempe aŭstria ĝeneralkonsulo, kiu invitis min al tagmanĝo kaj disponigis por la tuta dimanĉo aŭtomobilon de l' senato por rigardi la tutan regionon de l' Senato de la Libera Urbo Danzig. — Vizito ĉe senatoro d-ro Strunk en lia loĝejo. — La publika parolado estis fiksata en la Blua salonego de Danziger Hof je la 20 h. Sed duonhoron antaŭ komenco la 250 lokoj en la salonego estis jam okupitaj kaj oni devis okazigi la paroladon en la Granda Salonego, kie fine ĉeestis 450 personoj, inter ili la aŭstria ĝeneralkonsulo, senatoro Kurowski kaj gazetraportistoj. — La aranĝo tre plaĉis al la publiko kaj ĉiuj 4 gazetoj en longaj raportoj bonege skribis. — Sekvis grupkunveno, en kiu ĉeestis la Esperanto-patrineto, la 90 jara, ĉiam fervora membro de Int. Kuratora Komitato de IEMW, Anna Tuschinski, ĝis meznokto.

La 23. I. je la 9 h vizito al la episkopo en Oliva, grafo O'Rourke. Ni parolis pri Aŭstrio kaj poste ni trovis, ke ni havas komunan konaton, nome nian aŭstrian pioniron prof. d-ron Christanell en Salzburg, al kiu ni tuj skribis poŝtkarton. — Mi invitis laŭ peto de la Danzig-a E.-Asocio la episkopon en la Intern. Honoran Komitaton de Int. E.-Muzeo en Wien kaj lia moŝto akceptis. — Danzig-a f-ino dum la Krakova Kongreso konatiĝis kun japana d-ro kaj nun en oktobro ili deziras geedziĝi. La episkopo laŭ mia peto konsentis, ilin geedzigi en Esperanto en la katedralo en Oliva. — Krome la episkopo ankaŭ promesis helpi la movadon. — Poste gastigis min s-ino Tuschinski kaj enmanigis grandan bildon por la muzeo. Sekvis parolado kun lumbildoj en knabinlernejo, kiun ĉeestis 140 instruistoj kaj lernantoj. Mi je tiuj okazoj ĉiam invitas la lernantojn mem lerni kaj instigi al lernado ankaŭ siajn gepatrojn kaj parencojn. — Je 16 h okazis lumbildparolado en metilernejo por f-inoj, kiuj staras en diversaj profesioj. 240 personoj. — Je 22 h akcepto en la loĝio de Bontemplanoj, kie mi parolis pri Esperanto. Enkondukis min f-ino Spiess. Je la vizitoj akompanis min prez. Aeltermann.

La 24. I. vizito al la urbo dum 2 horoj kaj poste per la aŭtomobilo de l' Senato kun la flago de la Libera Urbo Danzig tra la lando Danzig, akompanata de Aeltermann. 118 km ni veturis kaj faris ankaŭ viziton al paroĥestro Aeltermann, la fraton de la prezidanto, en Mariensee kaj Meisterswalde. — Nokte mi forveturis al Bialystok.

Mi deziras ankoraŭ ion rakonti pri Libera Urbo Danzig, kiu per Kontrakto de Versailles estis disigata de la Germana Respubliko kaj formata kune kun la ĉirkaŭa teritorio kiel memstara liberŝtato. Pli ol 400.000 enloĝantojn ĝi nombras, inter ili 95 % germanoj, kaj pksm. 2000 kvadrat-km ĝi ampleksas. La konstitucio de Danzig estas garantiita de Ligo de Nacioj kaj laŭ komplementa noto »ĝi ricevas la konstitucion de libera urbo, ĝiaj enloĝantoj estas aŭtonomaj, ili ne venas sub la regadon de Polujo kaj ne fariĝas parto de l' pola ŝtato«. (El tre interesa broŝuro »Libera Urbo Danzig«, tradukita de Robert Kreuz, L. K., senpage havebla de la Danzig-a E.-Asocio). — Sed kiel la grandpotencoj multe fuŝis en la diversaj kontraktoj post la mondmilito, tiel ankaŭ tie. — Danzig, iama ege floranta urbo, — laŭ diroj de la publika opinio multe suferas pro la deviga ligiteco en diversaj aferoj al Polujo.

La antikva parto de la iama Hanso-urbo respegulas la potencan pasintecon de Danzig, la en tutmondo konataj monumentoj de konstruarto atestas la germanan karakteron de ĉi tiu urbo. El la antikvaj konstruaĵoj mi deziras citi: »Hohes Tor« (Alta pordego) en flandra altrenesanca stilo el 1588, gotika »Stockturm« (1346—1509) kun renesanca »Peinkammer« (torturdomo), »Langgasse« (strato) kun belegaj domoj de patricioj en renesanca stilo el la floroepoko de Danzig kaj je ĝia fino la Urbdomo kun 82 m alta turo el 1486 kun sonorilaro. Belegaj la unuopaj ejegoj kun siaj artecaj, orumitaj kaj pentritaj lignoskulptaĵoj kaj la raviga helica ŝtuparego kondukanta de la vestiblo supren al la labor- kaj akceptsalonegoj de la ĉefurbestro. En la urbdomo potenco, riĉeco kaj burĝa fiero de antaŭaj jarcentoj plej bone montriĝas. Apud la Urbdomo »Artushof« el 1330, ĝi servis antaŭe kiel kunvenejo de la burĝaro, nune borso. En ĉi tiu grandioza halo en 1927 la E.-reprezentantoj estis akceptataj de la Prezidanto de Danzig d-ro Sahm. »Grünes Tor« en flandra-holanda renesanco (1563), »Englisches Haus« (1570) kun riĉaj plastikaj ornamaĵoj, la grandioza katedralo Sa. Mario, komencita en 1280, kun 76 m alta senpinta sonorilturo, »Zeughaus« en nederlanda renesanco kaj fine Krantor« (gruo) el 1443, la mondfama simbolo de Danzig. — Mi ne volas citi ĉiujn novajn konstruaĵojn de Danzig, mi nur deziras revivigi en la vizitintoj de la Danzig-a Mondkongreso la belegajn tiamajn impresojn kaj instigi aliajn, rigardi ĉi tiun belega germanan urbon. — Sa. Maria estas la katedralo de la protestantoj (luteranoj); en Oliva, la sidejo de la katolika episkopo, troviĝas la katolika katedralo.

De Danzig mi forvojaĝis la 24. de januaro meznokte kaj veturis al Bialystok, la naskiĝurbo de nia majstro. La loĝantaro de 100.000 konsistas el pksm. 48% hebreoj, 47% poloj, 2% rusoj, 2% germanoj, 1% blankrusoj. Bialystok estas grava industria centro kaj sidejo de vojevodio en Palaco de Branicki. Interesa estas la ligna katolika preĝejo el 1576, al kiu estas alkonstruita granda nova preĝejo. Dum rusaj tempoj oni ne permesis novan preĝejon, sed nur alkonstruon kaj tiel ekestiĝis alkonstruita nova, granda preĝejo. — La 25. vespere kunveno en la belega ejegaro de la E.-grupo, kiu ampleksas la tutan teretaĝon de domo en strato Zamenhof, kiu apartenas al fervora s-anino Bertha Meiloch. Okazis festo de kursfino kun disdonado de atestoj kaj premioj. 150 personoj ĉeestis kaj mi raportis pri la E.-movado en Aŭstrio kaj Int. E.-Muzeo.

La 26. I. vizitoj al vicvojevodo Zawitowski kaj vicprezidanto de urbo d-ro Ziemilski, krome al referento de Urba Popoluniversitato kaj al la direktoro de Urba Biblioteko. La senlaca s-ano Ŝapiro akompanis min ĉien kaj kun li mi ankaŭ vizitis la naskodomon de nia majstro. Ĝi estas malnova kaj malalta ligna dometo kaj vizitata de ĉiu esperantisto, kiu vizitas la urbon. Ligna, kurbiĝanta ŝtuparo kondukas al la supra subtegmenta etaĝo en la loĝejon, kie naskiĝis Zamenhof la 15. XII. 1859. La loĝejo estas tre mizera kaj malgranda kaj konsistas el 3 ĉambroj, kies lasta eta estis la naskiĝĉambro. En ĉi tiu ĉambreto mi enskribis mian nomon en la tie konservata gastlibro. Kun respektego mi eniris ĉi tiun ejeton kaj kun larmoj en la okuloj mi memoris la afablan, tiel modestan homon, kiu donacis al la mondo tian riĉecon per sia Esperanto kaj kun kiu mi havis la grandan honoron kaj ĝojon interkonatiĝi dum la VIII. E.-Kongreso en Krakovo en 1912 pere de ges-roj Sergeant el Boulogne s. M., amikoj de nia mortinta majstro kaj ankaŭ miaj. Kaj en ĉi tiu momento mi desppli ĝojegis, ke mi antaŭ kvin jaroj komencis entrepreni mian vivofieron, la Int. Esp.-Muzeon en Wien, kaj tiamaniere metis eternan monumenton por la elpensinto de Esperanto L. L. Zamenhof en la Imperiestra Kastelo en Wien. Oni min nomis je komenco de ĉi tiu verko »utopiston kaj frenezulon« kaj mian laboron por la tutmonda esperantistaro »privatan mian aferon«, sed mia

persistemo kaj bonvolo por Esperanto venkis: Mi ne plu estis »utopisto« sed fariĝis »fondinto« de Int. Esp.-Muzeo en Wien kaj »mia privata afero« fariĝis »ŝtata«. — Tabulo marmora, fiksita sur la dometo, montras al la preterpasantoj, ke ĉi tiun modestan dometon eliris unu el la grandaj filoj de Polujo.

Laŭ la unuanima decido de la Urba Komitato de Bialystok (11. VI. 1919) strato Zamenhof ricevis sian nomon.

La 7. VIII. 1927 dum Postkongreso la vojevodo inĝ. Rembowski solene malkovris en ĉeesto de multnombraj diverslandaj esperantistoj la supre menciitan marmortabulon, kiun estis donacinta la urbestraro mem.

Zamenhofa Monumento en formo de 12 m alta Babela Turo estas nun konstruata en Bialystok laŭ projekto de konata varsovia skulptisto Ostrzega sur bela placo, dediĉita de ka komunumo. La solena ŝtonmetado okazis dum la II. Postkongreso la 12. VIII. 1931. — Ĉiu samideano kontribuu almenaŭ moneron por ĉi tiu monumento kaj sendu ĝin al la prezidanto de la Monumenta Komitato, nia senlaca s-ano J. Ŝapiro, ĉefdel. de UEA por Polujo, en Bialystok.

Elkoran dankon al ges-roj Ŝapiro pro ilia vere amika gastigo, mi sentis tie kiel tre ofte ankoraŭ dum mia vojaĝo, veran Zamenhofan spiriton!

La 27. I. je la 4. matene mi forveturis el ĉi tiu gastama urbo, akompanata al la stacidomo de Ŝapiro kaj aliaj samideanoj, al Kaunas, la ĉefurbo de Litovujo, ne simpla afero, ĉar ne eksistas interrilatoj inter ambaŭ landoj, Polujo kaj Litovujo. Litovujo asertas, ke la regiono de Wilno apartenas al Litovujo kaj ke Polujo mem konsentis tion, sed poste ne plenumis sian promeson, Polujo tion neas. En la landkartoj kaj fervojkartoj de Litovujo la tuta regiono de Wilno estas markata kiel litova regiono kun la rimarko »nuntempe okupata de Polujo«. — Pro tiuj malamikaj interrilatoj ankaŭ ne ekzistas senperaj interkomunikadoj. Oni nur povas eniri Litovujon el Polujo tra Latvio kaj tial devas fari grandan ĉirkaŭvojon per fervojo de kelkaj horoj. Tiamaniere la veturado de Bialystok al Kaunas daŭras pli ol 18 horojn. Ankaŭ la demando pri »Memel-regiono« estas iomete stranga. Sed pri tiu demando oni ja multe legis en la lasta tempo en la taĝjurnaloj en la diversaj landoj.

Do nokte post la 22 h mi alvenis en Kaunas, atendite de kelkaj s-anoj inter ili prez. Butkus kaj miaj konstantaj akompanantoj kaj helpantoj Kazlauskas Vladas kaj Duzanski, kaj kiel reprezentanto de la aŭstria konsulo, sekretario Kolis. Ili kondukis min en hotelon kaj poste mi estis gasto de la sekretario en hotelo Metropole, la unuaranga en Kaunas.

28. I. Unua vizito al la aŭstria konsulo, tre influhava bankprezidanto kaj grandindustriisto, S-ro A. Vasylius, kiu afablege min akceptis kaj disponigis por la tuta tago sian aŭtomobilon por miaj vizitoj. Li tuj anoncis mian viziton al la adjutanto de la ŝtatprezidanto, kiu pro malsano ne akceptis. Sed la adjutanto Sakmana telefonis, ke mi afable venu kaj ke mi enskribu mian nomon en la vizitlibron de l' ŝtatprezidanto. Mi veturis tien kun la konsulo kaj eternigis tie la Int. Esp.-Muzeon kaj donis al la ĝeneraladjutanto esperantaĵojn por transdono al la ŝtatprezidanto. Poste vizito al ministro por komunikado, s-ro inĝ. Viterius, kiun mi interesigis por enkonduko de la E.-insigno ĉe la fervojistoj kaj kiu disponigis al mi por du monatoj senpagan fervojbileton en la unua klaso. — Ministro por Instruado s-ro inĝ. Ŝakenis tre interesite aŭdis pri enkonduko de E. en la lernejoj de diversaj landoj kaj akceptis mian inviton, eniri la Int. Honoran Komitaton de IEMW. — Kun la direktoro de la Radiostacio mi priparolis mian Radio-paroladon, kiun Kazlauskas jam estis preparinta. Tre kora estis mia akcepto ĉe nia malnova pioniro, jam el la unua tempo de Esperanto, prelato Dombrowski, kiu invitis

min esti sia gasto kaj kiel lia gasto mi trapasis miajn malmultajn liberajn horojn en ege interesaj paroladoj kaj debatoj. Sekvis vizito al s-ino Tereza Kocin, kiu estis invitinta min je tagmanĝo kaj kun mi kelkajn s-anojn. S-ino Kocin, kiu estas la fratino de la mortinta edzino de nia majstro Klara, naskita Zilbernik, kaj Zamenhof estis dum kelkaj monatoj ĉe siaj bogepatroj en Kaunas, tiam Kowno. — Strato en Kaunas, kie Zamenhof loĝis, portas lian nomon. — Vespere publika parolado en granda kinematografejo de Jezuita gimnazio. 200 personoj ĉeestis kaj inter ili la aŭstria konsulo, la vicurbestro, prelato Dombrowski, s-ino Kocin ktp. — Post la parolado konsulo Vasylius gastigis min kaj miajn du akompanantojn en la unuaranga hotelo de la urbo „Metropole", kie ni je bonegaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ĉe la sonoj de bona muzikorkestro en agrabla babilado travivis sufiĉe longan tempon.

29. I. Vizitoj al la gazetoj „Naujas Zodis", „Diena", „Dienos Naujienos", „Lietuvas Aidas", „Zydu Balso", „Lituvos Zinios", kiuj parte ankaŭ en sufiĉe grandaj artikoloj raportis kaj publikigis intervjuojn kun mi. Kelkaj estis instigataj al regulaj E.-rubrikoj. — Sekvis vizitoj al vicurbestro Pinĉilius, provincialo de Jezuita Ordeno kaj rektoro de Jezuita gimnazio, Johannes Kipp, al rektoro de la universitato prof. Cepinski kaj prelato Maironis-Maĉurlis, rektoro de la episkopa seminario La vicurbestro promesis subteni E.-on kaj provincialo Kipp montris sian pretecon, instruigi siajn instruistojn en Esp. kaj poste enkonduki ĝin en la gimnazio kun ĝiaj 500 lernantoj. Li promesis ordigi la aferon kun prelato Dombrowski, je kies instigo mi ankaŭ proponis al prelato Maironis, fame konata litova poeto, la enkondukon de Esp. en la seminarion menciante, ke en la sama lernejo en Wien E. jam estis enkondukata. Li promesis raporti pri tio al sia episkopo kaj poste paroli kun prelato Dombrowski. — Prelaton Dombrowski mi invitis en la Int. Honoran Komitaton de IEMW kiel unu el la unuaj pioniroj de la movado. Li donacis al mi nur kelkajn librojn el sia riĉega biblioteko, sed promesis sendi aliajn. — Vespere mi estis gasto ĉe s-ino Janicki, del. de UEA, kiu gasteme min akceptis. —

(Daŭrigota.)

Esperanto-Akciono de la komerca lernejo Weiss.

En ĉi tiu lernejo kun frekvento de 600 personoj kalk. kons. R. M. Frey sukcesis aranĝi du nedevigajn kursojn kun 60 fraŭlinoj. „E.-Akciono" de la komerca lernejo A. Weiss (posedanto dir. R. Krickl) celas, disvastigi E.-on en kunlaboro kun „Viena E.-Laborkomitato" speciale en la komercaj kaj similaj rondoj. Protektantino fariĝis s-ino Helene Granitsch, vicprezidantino de „Aŭstria Virina Partio", kaj la semajna gazeto de ĉi tiu organizo „La vorto de la virino" de nun presigos artikolojn pri E.

Samtempe s-ano Frey fondis novan E.-Societon „Kuraĝe antaŭen!", kiu nun sub gvidado de s-ino Kasmader ĉiun ĵaŭdon inter 16-18 h aranĝas senkostajn, regulajn konversaci-ekzercadojn en la kafejo de Stafa, Wien VII. Mariahilferstr. 120, 2. etaĝo. Konsumado ne necesa!

Krome en Stafa s-ro Frey gvidas Esp.-kurson.

Prüfungen für das Lehramt und den Beweis des Esperanto.

Diese Prüfungen beginnen im Frühjahr 1932, am 4. April um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung im Gebäude der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt in Wien, I. Hegelgasse 14 und werden an den folgenden Tagen fortgesetzt. Die Prüfungsgebühr (20 S) für die Lehramtsprüfung und von 10 S für die Kenntnisprüfung ist vor Beginn der schriftlichen Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen.

Nian kondolencon al:

Direktoro **Kraft,** Wien, pro la morto de lia patrino,

S-ino **Warnier,** Paris, pro la morto de ŝia patro.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Linz, Weissenwolfstr. 31

Alvoko.

Gesamideanoj!

Ni batalas por alta celo; enkonduko de Esperanto por pli bona internacia kompreno, por ebligi alproksimiĝon de la diversaj popoloj. La interna ideo de Esperanto movado, paco, helpemo, servemo, homamo, forte ligis kaj ligas milojn da adeptoj diversgentaj al la movado. Jen la sekretoj de la sukceso de Esperanto kaj la el ili fluanta venkemo.

Nuntempe krizo premas la popolojn kaj unuopulojn. Ĝi senlaborigas multajn homojn, altrudas al ili zorgojn, malsaton. Certe ankaŭ inter ni, esperantanoj, ni havas tiajn bedaŭrindulojn. Ni ne forgesu ilin! Ni atestu kontraŭe nian solidarecon h lpante al ili per subteno kaj apogo, per klopodado havigi al ili laboron, oficon, perlaboron.

Insiste mi alvokas ĉiujn gesamideanojn je tiucela agado. Ne per vortoj, sed per faktoj agoj ni estas „Granda ronda familio". En bonaj kaj malbonaj tempoj ni staru kune, kiel boneguloj, fideluloj.

Karl Wannek, prez. de AEA.

Klosterneuburg estas la sola grupo, kiu ne ankoraŭ apartenas al nia Asocio. Ĝi plenumu nian peton jam letere esprimitan. Aliĝu!

Krems. Okazis ĉefkunveno. Elektita la sama estraro. De nun ankaŭ en „Niederöst. Volksblatt", semajna gazeto, aperos regule „Esperanto-Ecke". Al nia gazetperanto s-ro Stanke koran dankon por konscia laboro.

Linz: Novelektoj: Prez. dir. K. Wannek, sekr. Fantersitt, kas. Mraz. La membroj klopodas vigligi la grupan vivon.

Ried. Aktive kunlaboras en la gazetara servo fakinstr. Jungschaffer; dank al klopodoj de Oberstl. Buchleitner „Innviertler Zeitung" aperigos „Esperanto-Ecke", la kvara gazeto kun tia angulo.

Salzburg. Dum la jaro okazis la dekjara jubilea festo de nia grupo (27. ĝis 29. de junio), la Zamenhof- kaj Kristnaskfesto, parolvespero de s-ro Scherer (4. de decembro), 3 varbvesperoj, 14 estrarkunsidoj, 36 grupvesperoj 9 monataj kunvenoj, 1 ekskurso, 1 karnavalvespero, 1 jarkunveno, do entute 70 kunvenoj. Krom tio de la 7. X. ĝis 18. XII. estis ĉiuvendrede kurso en la klubejo, en kiu ĉeestis la plejgranda parto de la geklubanoj. Ankaŭ kunvenis kelkaj geklubanoj pli ofte, por prepari teatraĵon, amuzaĵojn por la kunvenoj ktp. Bedaŭrinde nia gupo nur malofte estis vizitata de eksterlandanoj. La ĉefcelo de la jaro estis, akiri novajn membrojn, kaj la membrolisto montras duobligon de la membraro Ankaŭ por la nova kurso anoncis sin jam pli ol 20 partoprenontoj. La gefunkciuloj de la venonta jaro estas: Prezidanto Fritz Stegmüller, Salzburg, Getreideg. 38; vicprezidanto prof. d-ro Franz Christanell, Salzburg-Parsch, Borromäum; kasisto Josef Pollhammer, B. B.-Oberrevident. Salzburg, Haunsperg-straße 27; dua kasisto Hermann Palfinger, Magistrats-Amtsrat, Müllner Hauptstr. 23; sekretario prof. Fritz Scheirl, Salzburg, M. Sittikusstr 21; bibliotekistino fraŭlino Ella Binder, Parsch, Gaisbergstr. 13. Krom tiuj 6 kunsidantoj En la estraro ni ankaŭ starigis novajn komisionojn: por disvastigo de Esperanto, por kursaranĝoj, por amuzado. Estas ankaŭ nia celo, en la ĉirkaŭaĵo de la urbo varbi novajn anojn kaj per tiuj fondi proprajn klubojn por la ĉirkaŭaĵvilaĝoj. Nia principo restos: „Ĉiam antaŭen!"

F Scheirl, sekretario.

Grupo Sigmundsherberg aliĝis al AEA. Ni kore salutas ĝin.

Wien: Laborkomitato de Vienaj E.-Societoj preparis Ĉe-metodajn kursojn, kiujn gvidos ge-Morariu tuj post Pasko.

Wien: Kalk. kons. Frey propagandis en diversaj rondoj per lumbildoj kaj paroladoj.

Wien: E.-Soc. „Danubio" kunvenas nun regule ĉiulunde en kafejo „Helenenhof", VII. Siebensterngasse 42. En kadro de parolata E.-gazeto, parolis la 15-an de febr. s-anoj Cech, d-ro Mildwurf, d-ro Postl, d-ro Pfeffer, Fr. Vasta k. a. — Raporto pri la ĝeneralkunveno, okazinta la 11. I. 1932. Post enkondukaj vortoj de la societ-estro oni honoris la mortintan Hon. Membron, s-anon d-ron Sós. La nova estraro konsistas el: R. Cech-prez.; kort. kons. Dr. Heeber k. O. Popper-vicprez.; Fr. Vasta k. Irma Ultmann-sekretarioj; A Stowasser k. A. Irk-kasistinoj; Minuska Mantel k. A. Denks-bibliotekistoj; Revizoroj: d-roj Postl kaj Mildwurf; konsilanoj: s-anoj Deistler, dir. Feder, Dr. Jokl, A. Klein, Dr. Klecka, Dr. Pfeffer kaj Dir. Schade, h. m. — Kotizo por la societjaro estas S 2.40 por la aktivaj membroj; S 4.— por subtenantaj membroj kaj S 1.— por studantoj kaj senokupituloj. — Honorigo. La s-anoj Oskar Zimmermann, afergvid. vicprez. de „Lab.-Kom. de Vienaj E.-Societoj" kaj Nikolao Hovorka, sekretario de la Lab.-Kom." es is pro iliaj meritoj por la Viena E.-movado nomitaj „Honoraj Membroj" de la Esp.-Soc. „Danubio". — Februaraj Societ-vesperoj. 1. II. S-ano dir. Fr. J. Schade, h. m.: Honorigo de P. Schleyer, aŭtoro de Volapük en Konstanz, somero 1931. 8. II. S-ino Minuska Mantel: La Vojo en la Vivon (Provo de Esperanta Filmrecenzo). 15. II. Parolata Esperanto-gazeto: R. Cech-Aktualaĵoj. Dr. Mildwurf-Senarmigo kaŭ militо, Dr. Postl-Nuntempa leĝaro, E. Rudner-

Humoro ĉe E.-Kongresoj, A. Klein-Esperanto kaj sporto. 22. II. 40 jaroj Esperanto-literaturo. Prelego el verkoj el ĉiuj epokoj de Esperanto: 29. II. Zamenhofa kaj moderna Esperanto poezio. Komenco ĉiam je 8-a vespere.

Gazetservo: Dum januaro aperis 15 sciigoj en 11 gazetoj, dum febr. 15 en 8 gaz.

Donaco: R. Ulbrich, Mattighofen, al AEA. S 6.—. Dankon.

Radio-Woche ĉiusemajne publikigas la programon de la E.-dissendoj.

Radio-Wien ilin publikigas laŭ ebleco. Uzu ĉi tiujn ĵurnalojn.

Mortis:

La 29. de januaro mortis en Innsbruck s-ro Heinrich Bederlunger. Li estis delegito de UEA kaj ĝis antaŭ 3 jaroj unu el la plej agemaj esperantistoj, kiam li pro familia malfeliĉo sin retiris de la publika vivo.

Roland Kühbacher por la Klubo Esperanto Innsbruck.

Espero Katolika de nun aperas en Collell (prov. de Gerona, Hispanujo) ĉe prof. Font-Giralt, prez. de IKUE, kiu nun redaktas ĝin. S-ano Dürschmid, Graz, Herrengasse 23, informas nin, ke li ne plu transprenos monon por la kotizo, sed estas preta akcepti mendojn.

ESPERANTO-SOCIETO POR STIRIO

Graz, VI., Schönaugasse 6.

Leitungssitzung 8. Jänner 1932. Nach Bekanntgabe der Aemteraufteilung und Berichterstattung über den Vortrag Scherer vom 1. Dezember (5, letzte Nummer) beschließt die Leitung von Wüster: Internationale Sprachnormung in der Technik anzuschaffen. Frau Bezirksschulinspektor Storm übernimmt die Vermittlung eines öffentlichen Esp.-Kurses an der Mädchen-Hauptschule in Voitsberg. Herr Prof. Hainschegg soll gebeten werden, seine stets zahlreich besuchten Vorlesungen wieder aufzunehmen. Von einer Jubiläumsfeierlichkeit wird mit Rücksicht auf die Wirtschaftskrise abgesehen.

Uebungsstunden. — Ab Februar finden jeden 1. und 3. Freitag von 8—9 Uhr in Dir. Horneck's Esp.-Sprachschule Uebungsstunden statt. Thema der 1. Stunde: Unterscheidung von Eigenschafts- und Umstandswort. Leiter: Dr. Biehler. Die weiteren Themen werden jeweils im Vereinsorgan bekanntgegeben. Dr. Biehler.

Rimarkindaj presaĵoj

Rivista Italiana di Esperanto, Udine.

Essenca e avvenire dell' idea d'una Lingua internazionale. 2. eld. 1931. Traduko el Esperanto de d-ro P. C. Monti, antaŭparolo de inĝ. R. Orengo.

Heroldo de Esperanto, Köln.

Aperas de la novjaro en pli granda amplekso kun aro da regulaj aldonoj: Lingva Kritiko, monata revuo por lingvaj demandoj (dir. prof. B. Migliorini, Roma); La Bela Mondo, monata paĝo por turismo ktp.; Nia Revueto, dumonata organo por la E.-junularo; La Strigo, paĝo pri literaturo kaj arto; Humoro, Distro, Ludo, paĝo por distrado; La Anteno, radiopaĝo; Sur la kvin linioj, paĝo pri muziko; La Regno Virina, paĝo por virinoj. — Mendu provnumeron: Köln, Brüsselerstr. 94.

Ŝirkalendaro por 1932, praktika mur- kaj tablo-kalendaro kun semajnfolioj. Utilaj indikoj, artikoloj, poemoj, pli ol 100 anekdotoj, spritaĵoj, ridigaj preseraroj, humorbildoj ktp. Rm. 1.50.

Viaj amikoj — la libroj. Ilustr. katalogo de Heroldo, eld. 1931/32. Utila gvidilo tra la eldonaĵoj de Heroldo. 24 paĝoj. Senpage!

Katalogo de Libroj, n-ro 8, nov. 1931. 48 paĝa listo de ĉiuj libroj haveblaj ĉe Heroldo. Senpage!

E.-sigelmarkoj en 12 lingvoj, nome angla ĉeĥa, Esperanta, franca, germana, hispana, hungara itala, nederlanda, pola, serbo-kroata kaj sveda. 10 propagandfolioj de unu lingvo (80 markoj) kostas mk —·55, 100 mk 4.40.

E.-Asocio de Nord-Ameriko, Fort Lee.

Libraro E. A. N. A. ankaŭ en ĉi tiu jaro eldonis aron da novaj libroj, inter kiuj ni ricevis jenajn:

No 4: The North American Esperanto Almanac 1931. Sur 173 paĝoj, belega papero, por duona Dolaro estas donita al la s-anoj parte en Esp. kaj en angla lingvo bonega propagandilo, enhavanta krom vere sciindaj informoj ankaŭ la liston de la estraroj de ĉiuj landaj organizaĵoj, lernlibron kaj vortaron. Dankon meritas la eldonanto J. J. Sussmuth, malnova pioniro. — Sed riproĉon ni devas fari: Mankas eĉ noteto pri ekzisto de Int. Esperanto-Muzeo en Wien, certe plej grava institucio por Esperanto, por la tuta mondo en Wien. Ĉi tiu instituto kapablus varbi por Esp. en ĉiuj rondoj, kiuj legos la Almanacon! Ni esperas, ke en la eldono por 1932 en la propra intereso de EANA ne mankos IEMW.

No. 5: Lando de arĝenta akvo. Rakonto el la Okcidento de Usono de Vingie E. Roe. trad. de E. S. Payson, Honora Prez. de EANA, 48 pĝ., 25 cendoj.

No, 6: La deveno de Esperanto. Eltiro el letero de L. L Zamenhof. La teksto estas en Esperanto kun angla traduko de al ni bone konata prez. de EANA, Henry W. Hetzel. 24 pĝ., 10 cendoj.

No. 7 American Esperanto Key de J. J. Sussmuth, 2. eld., prezo 10 c. Mallonga lernolibro kun vortaro en angla lingvo. Malmultekosta propagandilo.

No. 7 oni eldonis ankaŭ sur malpli dika papero, sed ricevebla por la duona prezo. Niaj amerikaj s-anoj estas prudentaj komercistoj!

Esperanto for the Globe-Trotter by Isabelle M. Horn. Bona propagandilo en angla lingvo por 2 cendoj. Steiner.

Dr. **Leopold Dreher, LK:** Anekdotaro, Studo per Rido. — 64 p. 12×16. Krakow Stabowislno 37. Propra eldonejo, prezo sv. fr. 1.—.
Kiel la subtitolo diras, estas la libreto destinata por perfektiĝemaj Esperantistoj. Ĝi estas progresiga kurslibreto. Tial estas bona ideo, ke sur la marĝeno vortoj (radikoj kaj kunmetaĵoj) kaj gramatikaĵoj estas klarigataj. La uzo de germanaj, francaj, anglaj, polaj vokabloj subtenas la laŭeble precizan komprenon de la vortoj.
Ĉar Grosjean-Maupin kaj Walter Lippmann la tekston reviziis, vi estu certa pri stilo kaj gramatiko.
La enhavo estas el la titolo „anekdotaro“ tre facile elkonebla; ĝi estas kompilaĵo el diversaj fontoj, precipe el „Juna Esperantisto“.
Ni memorigas, ke ankaŭ la lernolibro de la sama aŭtoro: „Supera Kurso de Esperanto“ estis favore akceptata. Lo-So.

Ekrelo, Leipzig.
Tri novaj volumoj.

Antaŭ ne longe oni povis legi en la gazetaro, ke la Soveta respubliko malgrandigis la elspezojn por propagandaj celoj. La novapero de ĉi-tri volumoj preskaŭ povus pruvi la malon. Kvankam ili certe ne kaŝas siajn tendencojn, ili tamen ne estas tro radikalaj. Inter ili ankaŭ troviĝas noveleto de Gorki. „Kiel mi lernis“ priskribanta, kiamaniere la verkisto trovis la vojon al edukiteco malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. En alia kajereto („Trapafita dekreto“) ni povas legi tri ukrainajn rakontojn el Galicio pri komisaro soveta, kiu dum atako en la ĉirkaŭaĵo de Strij perdis la vivon, sed gardis la revolucian manifeston, pri politike persekutitoj, kiuj fine trovis rifuĝejojn, pri kamparano mortpafita pro miskompreno dum la granda milito kiel spiono.

Pli grava por ni germanlingvanoj estas la lasta libreto „En la lando de Hindenburg“. Sufiĉe objektive la aŭtoro priparolas la meritojn de Junkers kaj Krupp, donas imitaĵojn el la laboristara vivo eĉ ne ĉiam indajn je publikigo — komparu „Sinjorino Fritzke — kaj komence detale priparolas la eldonaĵaron de Ullstein, kvazaŭ tiu firmao estus la sola peranto de germana kulturo. La laboro de la ceteraj: Diederichs, Voigtländer, Teubner, Hirth ktp. por li ŝajnas ne ekzisti.

Laŭ lingva vidpunkto la tri verkoj ne estas senararaj, sed ankaŭ ne tro malbonaj. Mi faris interalie jenajn notojn. Trapafita dekreto pĝ. 3 kial nome (wieso denn!) p. 5 krom ĉio (vor allem!) p. 16 plenpleni (anst. pleniĝi) p. 20 ordoni pri (anst. akuzativo) p. 21 la infanterio restanta p. 30 faru ĉion, kion necesas, p. 36 se ne la vesto soldata (senco: sen ies helpo) p. 41. konante lin kiel bona ribelulo, p. 47 li ĝin allasis (la knabinon) p. 54 por la memoro pri (je memoro de . . . .) p. 57 glatita (glatigta) p. 70 mi revenos hejmen en K. (urbnomo). **En la lando de Hindenburg** p. 4 ŝarĝi kun (anst. per) p. 9 superfluiĝinta litero (anst. estiĝinta superflua) p. 13 filmstelo (star!) p. 16 aparteni en (hineingehören in —) p. 18 enpenetri venenon (enpenetrigi) p. 23 jam komencitaĵo (aĵo jam komencita), p. 28 en la aliam (en aliaj tagoj), p. 29 ili forpelas lin (la majstrojn!), p. 47 intimkonsilisto (sekreta konsilanto, Geheimrat) p. 65 nature (kompreneble), p. 66 kvankam la 9-a novembro (malgraŭ la...). p. 77 fosiŝe gazeto (anst. gazeto de Voss). Interesaj, kelkfoje iom laŭvortaj tradukoj estas: p. 8 formtranĉmodelo (Schnittmuster), p. 10 mensogkokono (Lügengespinst), p. 15 lozungo (Losung; milita, ne ĉasa fakesprimo) kaj ‚incendi'raportisto (Brandreporter), p. 69 gisi (fandformi, gießen). Edukitecon pruvas la frazo sur p. 8 la mekanika Olimpio de Hofmann komprenis (pli bone: scipovis) kanti romancojn; iom pli ol originaleca estas la komparo de urbo ekster la fabrikdistrikto kun naĝhaŭto inter la fingroj de anserpiedo.
La pli malgrandaj eraroj de la Gorki-traduko ne tiom gravas.
D-ro fil. Wolfgang Biehler.

The Esperanto Publishing Co., London WC 1

„Miniaturoj“ de Geoffrey Dalrymple Nash. Tiuj versaĵoj estas verŝajne „originale verkitaj“, kvankam la lasta el ili treege similas la finon de ‚The passing‘ (J. M. Margaritae sorori) de Ernest William Henley. Ili laŭdas la feliĉon de amo (L' am-krio, Eta manet'), la belecon de naturo (Alpa vesperlumo), Reviviĝo montras intereson por infanoj (Donaco, Lulkanto), por ekzotikaĵoj (Gaela Dom-moto Veko Asfordelo, Budhana petego, Nigrula spirit'-kanto, Promeso nederlanda, Rajdante lernejon, Rido maŭrina, tiu grupo eble estas influata de la poezio de Robert Browning), „Ava Horloĝo“ imitas la skribmanieron de Arno Holz aŭ de angla samcelanto. La malmultajn „nur-esperantaĵojn“ (ekz. La tradicio) oni pardonos. De aliaj poemoj mi notu krome la „aĉan hundidon“, „Hieraŭ kaj hodiaŭ“, „La verdikto“.

Gravajn lingvajn erarojn krom plenita (anst. plenigita) mi ne trovis multajn. Laŭ ritmo la antaŭlasta strofo de „Reviviĝo“ estas iomete malbona. Ĉu ĝise (=ĝis nun) estos komprenata de ĉiuj legantoj? Same rikolta lun' (la monato Aŭgusto!) kaj precipe „Gento kaj Semul“ (‚semidoj kaj idolanoj‘, laŭ la lingvo de la nova testamento). ‚Je‘ ne estu konstruata kun akuzativo, same oni diru ‚sude‘ loĝas ŝi. La latinismo ‚Ĉu vi supozas min esti el Romo estas same anglismo, sed ne komprenebla por ĉiu.

La libro estas io por amikoj de la literaturaj frandaĵoj kaj precipe ŝatinda, ĉar la aŭtoro ne nur verkas versaĵojn, sed ankaŭ laŭ sia sentaro estas poeto.

D-ro fil. Wolfgang Biehler.

Literatura Mondo, Budapest.

Kenelm Robinson: Homarisma Laboro, unuaktaĵo.

Tridek-unu paĝetojn ampleksa kajereto. Okazas nenio, estas nur dialogo, jen inter du plenaĝuloj, jen inter du junuloj. La leganto ekkonu la karakteron de roluloj, sin prezentu kiamaniere kondutu la aktoro, ĉar en la ludo kuŝas la etiko de tiu ĉi du scenoj

La aŭtoro certe havas talenton ironiaĝi, karakterizi ian tipulon per simpla dialogo.

Lo-So.

Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

Nyckel till Esperanto. Laŭ la normoj de ICK. 9. eld., 100.-120. milo, 1932.

„ En malpli ol 2 jaroj 20.000 ŝlosiloj estis vendataj, entute ĝis nun 100.000; bona pruvo pri la bona laboro farita en Svedujo.

Esperanto Dili de Profesoro Mehmet Hulusi, Aydin, Turkujo. Mallonga lernolibro turka-Esp. kun latinaj literoj. 12 paĝoj 1931.

Mankas la supersignoj; verŝajne la presisto tiujn ne havas. Sed en tiu kazo oni anstataŭas ĝ per gh.

Eldonejo Ekrelo, Leipzig, 1931.

L. Ĉernov. Fervojstacio Znamenka. El ukraina lingvo tradukis la aŭtoro mem — Juna Bolŝevikino, kiu oferas sian vivon por savi la amaton kaj la triumfon de la komunaj idealoj venkontaj „elburĝan“ reakcion, jen temo, kies tragikon aprobos eĉ neaprobanto de tiu radikala celo. La noveleto montras multe da lirikismoj kaj malgraŭ la politika tendenco en pure homaj rilatoj tonon de rezigno. Laŭ lingva vidpunkto kelkaj malkorektaĵoj estus forigotaj, nome p. 7 iru la redakcion (al la r-o) kaj ‚Kiu (!) estas afero‘ (komp. angle ‚What is the matter‘, sed certe ne internacie komprenebla), p. 10 suna veziko (verŝajne sundisko, laŭ la aspekto), p. 12 ‚mi tratondris super du pontoj‘ kaj ‚faifigado‘ (sen -ig-). Entute la libreto ŝajnas esti bona specimeno de postmilita ukraina prozliteraturo.

D-ro fil. Wolfgang Biehler.

SAT, Paris 20., 23 Rue Boyer.

Protokolaro pri la XI. Kongreso en Amsterdamo, 2.-7. aŭgusto 1931. Mk. 0.45, 112-paĝa tre interesa enhavo. Mendu!

N. Szapiro, Warzwawa, Nowolipki 8.

Esperanto per Esperanto de Leono Vienano, 1932, 66 paĝoj, Zl. 1.75. Lernolibro de Esper. laŭ senpera (rekta) metodo kun metoda enkonduko.

Okamoto-Rikiĉi, Ŝuntoo-gun, Ŝizuoka-ken.

Evangelio de Sinkompletigo. VI volumo el „Evangelioj de Belismo“, 43 paĝoj, prezo Yen 0. 25.

A. Krauze, Riga.

Esperanto atslega. (Ŝlosilo) Laŭ la normoj de ICK. 1931. 15 sant.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) Bürgergasse 4, Fr (v) 20-23 h.

Linz.

Oberösterr. Esp.-Verein: Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstraße.

Steyr:

Oberösterr. E.-Verein: Gemeinschafterheim, Schlüsselhofstr., Fr. (v.), 20 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Freyung 6 (Schottenpfarrkanzlei) Mi (me) 18—20 h.

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Schubertring (kafejo Kolowrat) Fr. (v.) 19.30 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

Vienna AkademiaUnuiĝo Esp. VIII., Langegasse 61 (Kafejo Lange), Mo (l) 19—23 h.

Esp.-societo „Fideleco“, Café Zoglmann, XVIII., Staudgasse 1, Di (m), 16-19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.